Ĝenerala Asembleo 2013

# Tagordo:

1. Protokolo de la lasta asembleo
2. Raporto de la prezidanto
3. Raporto de la kasisto
4. Raporto de la kaskontrolantoj
5. Mortintoj, demisiantoj kaj novaj membroj
6. Kotizoj
7. Informilo
8. Elekto de la komitato
9. Elekto de la kaskontrolantoj
10. Programo 2013 - 2014
11. Proponoj kaj diversaĵoj

## Babilada Rondo

… okazas la 8-an de februaro ĉe Charlotte Blanc Maillard en Vevey kaj la 22-an ĉe Marie-Antoinette kaj Knud Sunier en Montreux. Estas bona okazo por plibonigi sian lingvon parole. Ĉiuj konsentas korekti unu la alian. Poste, ni kune manĝas la «kanadan» piknikon alportitan de ĉiu.





*Kelkaj rememoroj de la Zamenhofa festo je la 15-a de decembro 2012 en Laŭzano.*


**Laŭzana Esperanto – Societo**

Société Lausannoise d'Espéranto

Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28

esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

**Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63**
**Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto.: Knud Sunier * 021 961 38 56**



Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

Februaro 2013 – no 02


La komitato kunvokas la membraron al la …

# Ĝenerala Asembleo

de la Laŭzana Esperanto Societo (LES)

**lunde la 4-an de februaro 2013, je la 20-a**

ĉe la unua etaĝo de la stacidoma bufedo

**Lunde la 4-an de marto**
*Decidota*

**Lunde la 1-an de aprilo**
*Decidota*

**Lunde la 6-an de majo**
*Decidota*

**Sabate la 15-an de junio**
*Ekskurso*

**Lunde la 2-an de septembro**
*Decidota*

**Lunde la 7-an de oktobro**
*Decidota*

# Protokolo 2012

## de la ĝenerala asembleo de LES

kiu okazis la 6-an de februaro 2012
ĉe la unuaetaĝa salono de la bufedo CFF en Laŭzano.

Ĉeestis 10 aktivaj membroj : David Buhlmann (prezidanto) – Charlotte Blanc Maillard (vicprezidanto) - Sonia Daubercies (kasisto) – François Randin (sekretario) – Rosario Scopelliti – Christiane Andreae – Claude Blanc - Gilbert Darbellay – Giulio Grigoletto – Monique Golaz.
Ĉeestis 5 kandidatoj : Viktor Gyözö – Eloïse Bernier – Renée Chollet – Marie-Antoinette Sunier – Knud Sunier.
Senkulpiĝis 5 aktivaj membroj kaj 1 kandidato:
Lucienne Dovat - Cléa Robin – Nancy Fontannaz – Françoise Pétermann – Pierre Delaunay – Yannis Amaudruz

**La prezidanto malfermas la asembleon je la 20-a kaj 10.**

**- La tagordo** estas akceptita unuanime.
**- La protokolo de la lasta asembleo** estas akceptita unuanime.
**- Raporto de la prezidanto:** David Buhlmann raportas pri la diversaj eventoj en 2011 – 2012.
**- Raporto de la kasisto:** Sonia Daubercies raportas pri la diversaj movaĵoj de nia kaso. Ŝi ne kapablas anonci, kiu membro ne pagis dum du jaroj; la listo ne estas aktuala.
**- La raporto de la kaskontrolantoj** subskribita de Françoise Pétermann kaj Rosario Scopelliti estas legita.
**- Voĉdono pri la raportoj:** La raportoj de la prezidanto, de la kasisto kaj de la kaskontrolantoj estas kune akceptitaj unuanime.

*La komitato surpriziĝis rimarki, ke Sonia Daubercies, dum la tuta jaro 2011, tute ne okupiĝis pri la kaso de nia societo kaj ke la librotenado estis aktualigita nur komence de 2012.*

*Plie, la komitato konstatis, ke la deklaracio imposta, transdonita marte al la kasistino restis endosiere kaŝita tutjare malgraŭ multaj rememorigoj. Tiel, sekve, nia societo ricevis monpunon de sFr 180.- pro ne sendo de la deklaracio 2010. La sekretario provis eksigi la monpunon sendante leterojn kaj irante al Yverdon paroli kun la oficejestro.*

*Januare 2012 Sonia Daubercies ricevis tri leterojn (de David Buhlmann, Charlotte Blanc Maillard kaj François Randin) por klarigi la aferon. Ŝi neniam legis ilin. Konsekvence, la komitato decidis demisiigi ŝin el ŝia respondeco kasista pro ŝiaj mankaĵoj.*

Dum la asembleo, Sonia Daubercies re-donis la tri leterojn al la komitato - ankoraŭ fermitajn - kaj anoncas sian demision kiel membro de nia societo. Ŝi tuj volis legi tekston.
La prezidanto klarigis, ke statute ŝi ne povas demisii dum la asembleo kaj devos atendi 2013. Ŝi insistegis. Pro pac-neceso, David Buhlmann lasas ŝin legi.
Pro tio, kio estas ĉi-supre klarigita, la respondeco de la kaso estos konfidita al nova kasisto.

**- Demisiantoj kaj novaj membroj:** Pierrette Blanchet sendis leteron por anonci sian demision pro sia multjaraĝo. Viktor Gyözö, Knud kaj Marie-Antoinette Sunier, Yannis Amaudruz, Eloïse Bernier kaj Renée Chollet estas akceptitaj kiel novaj membroj.
**- Kotizoj:** Françoise Pétermann proponis altigi la kotizon por ne plu pagi poindividue la salonon ĉiumonate. La propono estas rifuzita de ĉiuj (escepte Rosario Scopelliti kaj Claude Blanc).
La propono, ke ĉiuj membroj – komitatanoj kaj helpantoj inkluzive – honoraj membroj ekcepte – pagos la normalan kotizon ekde 2012, estas akceptita de ĉiuj (escepte Christiane Andreae). La kotizo restos po sFr 50.- por la aktivaj kaj po sFr 30.- por la pasivaj membroj kaj po sFr 10.- por la junuloj.
**- Nia retejo** neniam estas vizitita de la membroj. La asemblo decidas ĉesigi nian retlokon www.alawa.ch/les.
**- Informilo:**_Françoise Pétermann konsentas daŭre okupiĝi pri la redakcio de nia informilo. Ŝi sendas la komputilan tekston al Nancy Fontannaz, kiu konsentas korekti ĝin antaŭ transdoni ĝin al François Randin, kiu ĉiumonate sendas la informilon perposte aŭ perrete al la membraro. Memore: Ĉiuj membroj - aktivaj, pasivaj, junaj kaj honoraj - ricevas **perpoŝte** la februaran informilon (kunvokon al la ĜA – protokolon lastasemblean – aliĝilon venontjaran pri la informilo – kotizpagilon).
**- Elekto de la komitato:** Knud Sunier proponas sin okupiĝi pri la kaso. Li estas tre dankita. La komitato estas elektita unuanime:

**Prezidanto : David Buhlmann * Vice-prezidanto : Charlotte Blanc Maillard**
**Kasisto: Knud Sunier * Sekretario: François Randin**

**- Elekto de la kaskontrolantoj:** Françoise Pétermann prezidos en 2012. Monique Golaz estas elektita kiel nova membro.
**- Dataro 2012 – 2013**: Françoise Pétermann kaj Cléa Robin proponis ŝanĝi la semajntagon de niaj kunvenoj (ekz. merkrede anstataŭ lunde). Sondado rimarkigis ke, pri ĉiu semajntago, du aŭ tri membroj estas okupitaj aliloke. La membraro do decidis konservi la unuan lundon de la monato kiel kunven-dato.

**La monataj kunsidoj**:
La 5-an de marto – la 2-an de aprilo – la 7-an de majo - la 3-an de septembro – la 1-an de oktobro – la 5-an de novembro – la 7-an de januaro 2013.
La ekskurso okazos sabate la 9-an de junio - la Zamenhofa Festo ... sabate la 15-an de decembro kaj la ĝenerala asembleo ... la 4-an de februaro 2013.

**La budo en la bazaro en Laŭzano**:
Sabate la 5-an de majo - la 2-an de junio - la 30-an de junio - la 14-an de julio - la 28-an de julio - la 11-an de augusto - la 1-an de septembro - la 15-an de septembro - la 6-an de oktobro.

**- Proponoj kaj diversaĵoj**: Charlotte Blanc Maillard rememorigas pri la dato de la asembleo de la Svisa Esperanto-Societo en Vevey, la 28-an de aprilo. Ĉiuj estas invititaj al la inaŭguro de la ekspozicio en "La galerie du Magasin du Monde" la 4-an de aprilo.
François Randin re-enmovigas nian verkon komunan: *La Mistera Kastelo*. Renée Chollet, Marie-Antoinette Sunier, Viktor Gyözö kaj Monique Golaz deziras « verki ».

**La prezidanto fermas la asembleon je la 22-a.**

La sekretario : François Randin